GISTO-150499
GOVaske
PK, 126
95760-000 Kaiurbo-RS

Karaj geamikoj, jen nova teksto. Ĝi celas igi vin legi iomete, por ke la verda ero en via kapo ne rustiĝu. Memoru ke baldaŭ okazos grava E-evento en Florianópolis. La gaŭĉa delegacio portos la respondecon digne reprezenti samideanojn kiuj ne povos veturi tien. Ĉiu pretigu lon, por prezenti antaŭ la publiko tie. Laŭ mia opinio ĉiam oportunas reciti almenaŭ malgrandan poezion. Eĉ homoj kiuj ne kuraĝas engaĝiĝi en konversacia rondo, per deklamado de teksto sukcesos kaŭzi bonan impreson. Sed, mia kara, la parkerigita teksto nepre estu lerte prezentita, sen balbuti.

RADIO

Ĉu vi amas aŭ almenaŭ konsideras bona la kreitaĵon de Zamenhof ? Do vi devas nepre posedi bonan radion,modernan, kiu ricevas kurtajn ondojn. Nuntempe ĈRI atingas Sudamerikon per bonega signalo laŭ la frekvenco 7120 Khc, matene je la 11,00 UTC (nun, 8h). Por kiu lernis nian lingvon sed devas plibonigi sian parolkapablon ĝi estas bonega helpilo ĉar oni kutimiĝas al la internaciaj dirmanieroj, kutimiĝas al la "muziko de la idiomo" kaj tiel oni perfekte komprenos ĉiun aŭditan vorton en E-rondo. Tiel oni povas tuj kaj ĝuste reagi, same kiel en rondo ĉimarona. Valoras la penon investi kelkajn Realojn, por ĝui la tre agrablajn voĉojn de la geparolistoj. Samtempe ni devas ofte sendi letereton al ties estraro ĉar laŭ la nombro de leteroj ricevitaj kreskas la prestiĝo de ĈRI ĉe la ĉinla registaro.

KONTRAŬMILITA RIMEDO

Enkonduke en la UNESCO-constitucion oni legas :
"Konstatinte ke militoj estiĝas en la homaj mensoj, en la mensoj de la homoj oni devas konstrui fortresojn por defendi la pacon"

Ne forgesu: multaj vortoj, vaste uzataj tra la mondo, ankoraŭ ne trovis lokon en PIV. Ekz., PIZZA=PICO; Ĉimarono, Ĉurasko. Ni laborigu nialandan akademianon, Geraldo Mattos, cele oficialigi la vortojn.

DORSOFLANKE TROVIĜAS INICIATO IMITENDA KIU NE MEMSIGNATURIS LA PETSKRIBON DUM LA "VERDA KAFO" BV MEM VERKI LETERON IEL SAMENHAVAN.

VASKE, Georgo Otto
Str.Esperanto, 880
95760-000 S.S.do Caí-RS
Aprildekan, 1999.

Al
ISRAELA REGISTARO
ISRAELO.

Respektoplenajn salutojn el Brazilo !

Konstateblas ke, por 90% de la homaro, lerni la anglan lingvon malfacilas en tioma grado ke, krom ege malmultaj, la ceteraj nur papagas vortojn. Kaŭzas tion ĝia skribo kaj ĉefe pro la tute malregula prononco de samaj literoj kaj silaboj. Anglujo kaj Usono ignoras tion sed insiste trudas lilian lingvon. Paralele rimarkeblas bojkotoj kontraŭ la disvastigado de la tute regula kaj neŭtrala lingvo Esperanto.

Mia penso iras al Israelo. Israelidoj okupas ĉefajn postenojn en ĉiuj landaj registaroj kaj organizaĵoj ĉar ili elstariĝas pro la inteligento kaj kapablo Prognozeblas ke baldaŭ israelidoj regos la mondon. Ni esperantistoj fidas ke ili, same kiel Lazaro L. Zamenhof la kreinto de Esperanto, alstrebas la tutmondan pacon pere de neŭtrala lingvo en internaciaj rilatoj. Per tio ili fariĝos simpatiaj al justaj homoj de ĉiuj nacioj. Aldonindas ke, tutmonda registaro bonvenas, por puni landajn registarojn kiuj fuŝe zorgas pri la ĉirkaŭmedio.

Tutkore oni petas al vi karese pripensi la enhavon de ĉi-petskribo kaj lerte manovri por ke ĉiuj E-organizaĵoj tra la mondo de nun ricevu potencan subtenon far ĉiuj israelidoj.

Atentoplenaj atendas viajn favorkorecon,

Sinjoro
AVRAHAM ŜLAIN
4Z4LX = Rami
POKesto, 36242 Tel-Aviv.

Georgo Otto Vaske

Tre estimata samideano, koran saluton !

Ĉi-kune vi ricevas petskribon adresitan al viaj landa registaro. Tial ke ni ne regas la oficialan lingvon de via nacio, oni prenas la rajton peti de vi la grandan favoron traduki la tekston kaj sendi ĝin (kun la originalo(?) al instanco(j) kiu(j), laŭ vi, plejzorge priatentos nian komunan aferon.

Mi kaptas la okazon informi vin pri la nuntempa propagado al Sudameriko. Ĝi iante pliboniĝas. Staciojn el Eŭropo oni jam aŭdas bone. CT-stacio atingis nin per signalo 59+10 Db. Ĝi daŭras en ĉiu semajnfino, 14266 Khc, je la 20,30 UTC, kun 2- 3 braziljaj plus unu ĉilia kolego. Al nia kara PT2CA=Enivaldo, hieraŭ, mi referis al miaj leteroj. Li memorigis ke via moŝto delonge ne plu plezurigas nin per via partopreno kaj mendis saluton pere de mia skribo al vi. Do, ni scias ke la tempo por vi estas ne tre oportuna sed, iam BV reaperi en nia QSO, por ĝojigi la kolegojn. 73.

Por ĉio, koran antaŭdankon,

Georgo Otto Vaske